

Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 5 Majo, 2011



Kara Leganto, mi, kiel redaktoro, devas pardonpeti pro la personafera prokrasto de ĉi numero, sed ĝi finfine aperas; bedaŭrinde, ne meze de la kuranta monato. Pardonu denove...

Fine de Aprilo pri la “nigra” jubileo en la historio de Ukrainio kaj de la tuta homaro prelegis V. Pajuk. Neordinaran ideon por disputo proponis s-no K. Offutt.

*En nia ŝtato aperis samideano-verkisto, rakonton de kiu ni planas aperigi julie. Do, ek!
–La Redakcio*

“Nigra” Jubileo

Atentema leganto jam rimarkis la daton “XXV”, kaj li (ŝi) pravas: antaŭ 25 jaroj, nokte la 26-an de Aprilo eksplodis la nukle-elektra centralo en Ĉornobilo – la urbeto situanta pr. 100 km norde de la Kijivo – tiama ĉefurbo de la Ukraina Socialisma Soveta Respubliko (mi persone malŝatas la lastajn tri vortojn, sed)... La centralo portis la nomon de Lenin kaj, kiel oni kantis dum sovetia tempo, “Lenin ĉiam estas vivanta...” (vd. foton el Ĉornobilo). Multaj ukrainaj aŭtoroj dediĉis siajn verkojn al tiu katastrofo, unu el ili – la plej renoma nuntempe ukraina poetino (antaŭ kelkaj monatoj evidentiĝis, ke ŝi verkas ankaŭ prozon) – Lina Kostenko. Tradukis, speciale por nia bulteno “SALUTON!”, la plej fama, sendube, E-poeto kaj tradukisto el Anglio – Kris Long:

*Arbar’ malpuras, ruba ter’ novalas,
atomcentraloj super tri riveroj...*

Kiu poltronas? Kiu kanibalas?

Sonor’ funebra. Blago nur, malveroj.

Vi bunkras en arbaro, ĉu, bankrote?

Kion plu janiĉaroj ŝipatronos?

*Mortintoj kaj vivantoj kaj naskotoj
neniun el vi – nepre ne – pardonos!*



Interesa situacio disvolviĝis en la ukraina socio – ĉiuj memoras pri la “nigra tago”, sed la registaro faras nenion, kvankam antaŭ nelonge sur la japanaj insuloj, en Fukuŝimo patrino-naturo aranĝis Ĉornobilon-2. Oni okazigis la konferencon por kolekti monon por la nova kovrilo. Kolektis nur tri kvaronojn de la bezonata sumo. Alia interesa afero, konferencon “rajtas” partopreni nur unu persono el du: komisionestro de EU aŭ prezidento de Belorusio. Ukraina prezidento faris “solomonan” decidon: konferencon partoprenu ĉefulon de EU, kaj la prezidento de Belorusio venu al la funebraĵoj nome en Ĉornobilon, kune kun kolegoj-prezidentoj de Ukrainio kaj de Rusujo. Rezulte, “bacjka” (beloruse – patro) Lukaŝenko aperis nenie.

Al la Ĉornobila katastrofo dediĉis sian renoman verkon iama ambasadoro de Ukrainio en Israelo, Kanado kaj Usono, d-ro de medicino (epideimologio), membro de la Verkisto Asocio de Ukrainio, iama ministro pri ekologio, subtenanto de E-o kiel interlingvo en la Verdula komunumo d-ro Jurij Ŝĉerbak. Al via atento estas proponata la lasta

paĝo de la romano: “... Ĉornobil’ estas la evento senekzempla en la monda historio, kun kiu povas esti komparita neniu ĝis nun konata katastrofo. Nek pereoj de “Titanik”..., nek akcidentoj de de aviadiloj, nek eksplodoj en minejoj, eĉ



kun multaj viktimoj, ne povas esti komparataj kun tio, kio okazis en Ĉornobilo: tiu ĉi “stelo Absinto” kvazaŭ estus sendita el estonto, el la XXI-a jarcento (red. – kiam ni nun vivas), al ĉiuj ni kiel minaca averto – rekonsciiĝu, ekmeditu pri la tuta evoluo de la civilizo, faru, dum ne estas malfrue, seriozajn komkludojn.

Cetere, la unuaj seriozaj signaloj, unuaj avertoj estis senditaj al ni ankoraŭ en la jarcento XIX-a: rememoru ni Dostojevskij-, Tolstoj-, Jules Verne-, Engels-, Vernadskij-n. Ĉiu el ili siamaniere avertas nin. Ni ne aŭskultis... Ne kredis... Ne pensis: ili nenion komprenas. Ili estas naivaj kaj malmodaj. Ne estas venkintoj, por ni ĉio estas atingebla, ni ĉion scipovas! Ni povas forgesi pri la konscienco kaj dekalogo, povas rapide, laŭplane formi novan, idealan homon – necesas nur pli bone lin edukadi en lernejo kaj dum politikaj informadoj. Kaj venis ni – al Ĉornobil. Ni

venis al krizo de la kredo. Ne venis al la rando de abismo...

...Venis Pasko de la jaro 1988, kaj mia filino Bohdana decidis fari donacon al la avino – mia patrino, estanta en malsanulejo, – al la homo, profunde kredanta je Dio. Laŭ la delonga ukraina popola tradicio ŝi pentroomamis la paskajn ovojn – “pi(y)sanki. Hela, belega tradicio, devenanta ankoraŭ el “antaŭkristanaj” epokoj: ovo estas simbolo de vivo, printempo, suno. Kioma ja estis mia teruro, kiam inter aliaj mi ekvidis unu pisankon kun desegno de atomo, Ĉornobila atomcentralo, pikdrato kaj subskribo: “Fermita Zono!”

La unua ĉornobila pysanko en la historio de nia Ukrainio.

–Preparis V. Pajuk

Lanĉita Estas Reeldono de Maskerado de Tivadar Ŝoroŝ



La 12-an de aprilo 2011 en Novjorko okazis festo por lanĉi reeldonon de la anglalingva traduko de la Esperanto-verko de Tivadar Soros Maskerado ĉirkaŭ la morto. La verko pritraktas la sukcesan transvicon de la familio Soros en Budapeŝto dum la sistema persekutado kaj mortigo de la hungaraj judoj fare de la nazioj en la finaj jaroj de la Dua Mondmilito.

La festo, en la hejmo de la financisto George Soros, filo de Tivadar, kunvenigis grupon de elstaraj intelektuloj de la regiono. Ĉefa parolanto estis Humphrey Tonkin, kiu, en sia rolo kiel tradukinto, havis la taskon prezenti la libron kaj paroli pri ĝia ekesto.


La libro aperis originale en Esperanto en 1965 kaj en dua eldono en la jaro 2000 – la jaro de aperigo (en Britio) de anglalingva traduko de Humphrey Tonkin.

–ESF

Penso de Nia Samsocietano:

Mi opinias, ke estas ekzemploj de gejeco pri viroj kaj virinoj, rakontitaj en la Biblio. Unue, Kaino kaj Habelo estis geje enamitaj unu kun la alia, kiam ili supoze malpacigis, Habelo kun Kaino. Kaino iĝis kun klinita kresto kaj sentis rankoron pri siaj oferoj al Dio komparantaj al la oferoj de sia frato, Habelo. Kaino havis egoismon al Dio pri siaj oferoj. Ni vidas nuntempe tiajn enviojn hodiaŭe kiuj kondukus eĉ al murdo tiel kian Kaino kaj Habelo. En egoismo Kaino miskomprenis siajn sentojn de ameco en envioj kaj murdis sian fraton pro liaj oferoj al Dio. Sed tiele estas Kaino kaj Habelo okazo de fruaj, gejoj amantoj (kaj por plia malfrua plibonigo), [Genezo 4:1-16].

–Karlo Offutt



Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – D-ro Les Kordylewski
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;
Familia membro: \$30,
Regula: \$20
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library
4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL
Kunvenoj komenciĝas
je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.**

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

24an de Majo – M. Shafroth: Kio okazas en Viskonsino?

26an de Junio – Tradicia Pikniko